BEL informas

n-ro 24/2014

la 24an de oktobro 2014

24 de outubro de 2014

Sanpaŭla kongreso okazas sukcesege

Congresso paulista acontece com enorme sucesso

Ararakvaro akceptis la 8-an Esperantan Kongreson de la Ŝtato San-Paŭlo en la 18-a kaj 19-a de oktobro, kie ĉeestis apud la urbestro, Marcelo Barbieri kaj la magistratano Juliana Damos, pluraj estraranoj de BEL, BEJO kaj lokaj movadoj. La evento estis gratulinda kaj sukcesoplena. Pli ol 40 urboj reprezentiĝis, krom sep brazilaj ŝtatoj. Furoris nova prezentmodelo konsistanta el serioj de ses 8-minutaj prelegetoj, inspirita de la modelo de TED Talks. Okazis fulmkurso por interesatoj, kaj la libroserva ekspozicio ravis pro tiom belaj kaj modernaj verkoj vendataj.

BEL Informas varme gratulas la organizantojn kaj petas al la nacia movado atenti pri tiu bela ekzemplo!

BI

Araraquara recebeu o 8º Congresso de Esperanto do Estado de São Paulo nos dias 18 e 19 de outubro, onde estavam presentes, ao lado do prefeito Marcelo Barbieri e da vereadora Juliana Damos, vários diretores da BEL, BEJO e de movimentos locais. O evento foi louvável e de pleno sucesso. Mais de 40 cidades estavam representadas, além de sete estados brasileiros. Foi um grande sucesso o novo modelo de palestras de 8 minutos, inspiradas no modelo de TED Talks. Houve um curso rápido para interessados e exposição de livros e de belas e modernas obras que estavam à venda.

BEL informas calorosamente parabeniza os organizadores e solicita ao movimento nacional seguir este belo exemplo!

BI

Urbodomo registras sukceson de la sanpaŭla kongreso

Prefeitura registra sucesso do congresso paulista

La retejo de la urbodomo bone registris impresojn pri la unua tago. La urbestro Marcelo Barbieri amike parolis pri Esperanto kaj siaj impresoj. Enestas komentoj pri BEL, BEJO, UEA kaj EASP. Legu plie:

http://www.araraquara.sp.gov.br/Noticia/Noticia.aspx?IDNoticia=10818

BI

O site da Prefeitura da cidade registrou uma matéria sobre o primeiro dia do evento. O prefeito Marcelo Barbieri falou de forma amigável sobre o Esperanto e suas impressões. No site há comentários sobre BEL, BEJO, UEA e EASP. Leia mais:

http://www.araraquara.sp.gov.br/Noticia/Noticia.aspx?IDNoticia=10818

BI

Ararakvara magistrato amike parolas pri la kongreso

Câmara de Araraquara informa cordialmente sobre o congresso

Siavice, pro la amika atento de la magistratano Juliana Damos kaj ŝia teamo, la retejo de la urba magistrato registris belajn komentojn pri Esperanto kaj la kongreso. Legu plie:

http://www.camara-arq.sp.gov.br/site/index.php/juliana-damus-congresso-de-esperanto-reune-40-cidades-e-sete-estados/

Dum la malfermo, Juliana Damos kurioze rememoris, ke la 18-a de oktobro estas la tago de kuracistoj en Brazilo. Zamenhof kaj Paulo Sérgio Viana estis amike gratulataj.

BI

Por sua vez, por causa da atenção amigável da vereadora Juliana Damos e sua equipe, o site do Câmara Municipal registrou belos comentários sobre o Esperanto e sobre o Congresso. Leia mais:

http://www.camara-arq.sp.gov.br/site/index.php/juliana-damus-congresso-de-esperanto-reune-40-cidades-e-sete-estados/

Durante a abertura, Juliana Damos lembrou curiosamente que 18 de outubro é o dia dos médicos no Brasil. Zamenhof e Paulo Sérgio Viana foram parabenizados pelo dia.

BI

Kaj sekve… BEL-konferencoj!

E a seguir… BEL-konferencoj!

BEL-Estraro decidis revivigi la eventojn "BEL-konferencoj", sub respondeco de Prof. Paulo Sérgio Viana. La unua konferenco de tiu ĉi periodo okazos en la urbo Juiz de Fora / MG, **je la 3-a de aprilo 2015** (de la 12-a ĝis la 17-a horo) kaj je la **4-a de aprilo 2015** (de 9-a ĝis la 17-a horo). Tute oportuna konferencejo jam estas je nia dispono en tiu simpatia urbo, danke al kompetenta loka aktivado de Prof-ino Maria Nazaré Laroca.

"BEL-konferencoj" ne estas kongreso aŭ ordinara renkontiĝo. Ĝi celas altnivelajn diskutojn pri variaj temoj de ĝenerala kulturintereso. Ili konsistas el naŭ 40-minutaj prelegoj sekvataj de demandoj de la publiko kaj libera interŝanĝado de ideoj. La temoj ne devas inkluzivi nur Esperanton kaj movadon, sed ankaŭ ĝeneralan pripensadon pri nia lando, nia mondo, nia tempo. Ni intencas eldoni kajeron kun la resumoj de ĉiuj prelegoj.

La partopreno estos senpaga kaj senburokratia: ĉeestu ĉiuj, kiuj interesiĝas. La prelegontoj nenian honorarion ricevos. Ili disponos pri komputila projekciilo kaj devos akcepti la kompromison sendi al Paulo Sérgio Viana du-tri-paĝan resumon de sia

A diretoria da BEL decidiu retomar o evento "BEL-Konferencoj" (Conferências da BEL), sob a responsabilidade do professor Paulo Sérgio Viana. A primeira conferência deste período acontecerá na cidade de Juiz de Fora, no dia **3 de abril de 2015** (de 12h até 17h) e no dia **4 de abril de 2015** (de 9 da manhã até 17h). Um centro de conferências totalmente oportuno já está à nossa disposição nesta simpática cidade graças ao competente ativismo local da professora Maria Nazaré Laroca.

"Bel-Konferenco" não é um congresso ou um encontro comum. Ele tem o objetivo de discutir sobre vários temas de interesse cultural de forma geral. Consiste em nove palestras de 40 minutos seguidas de perguntas do público com um livre intercâmbio de ideias. Os temas não devem ser apenas sobre o Esperanto e o movimento esperantista, mas também reflexões sobre o nosso país, o nosso mundo e o nosso tempo. Pretendemos editar anais com os resumos de todas as palestras.

A participação no evento é de graça e sem burocracia: apareçam todos que se interessarem. Os palestrantes não receberão nenhum honorário. Eles disporão de um projetor e deverão aceitar o compromisso de enviar um resumo com duas ou três páginas

prelego **nepre ĝis la 30-a de novembro 2014**. La titolon de sia prelego ili devos sendi pli frue, ĝis la fino de oktobro, por preparo kaj disvastigo de la programo.

BEL Informas havas la honoron reinviti vin kiel unu el la prelegantoj. Se vi interesiĝas pri tio, kontaktu nin pere de la retpoŝtadreso bel.informas@gmail.com.

BI

das suas palestras para Paulo Sérgio Viana **até 30 de novembro de 2014**. O título da sua palestra deve ser enviado antes, até o fim de outubro, para que seja preparado e divulgado o programa.

BEL infromas tem a honra de reconvidá-lo como um dos palestrantes. Se você se interessa, contate-nos pelo email bel.informas@gmail.com

BI

USP-studgrupo invitas

Ekde 20/10 Karina, E-instruisto ĉe la Universitato de San-Paŭlo (USP), kaj aliaj esperantistoj renkontiĝas ĉe FFLCH (Fakultato pri Filozofio, Beletro kaj Homaj Sciencoj), ene de USP, por praktiki Esperanton. Ĉiun semajnon ni legos malsamajn tekstojn (mallongajn), elektitajn dum la antaŭa semajno. La renkontiĝo okazos de la 18h ĝis la 19h. Se iu volas partopreni, tiu estas bonvena. Por pliaj informoj, skribu al Karina: kgsoliveira@gmail.com.

En la venonta semajno komenciĝos ankaŭ nova grupo por komencantoj lerni la lingvon. Karina gvidos la lecionojn en la sama loko ĉe USP, ĉiuj mardoj, de la 17h30 ĝis la 18h30.

BEJO

Grupo de Estudo da USP convida

A partir de 20/10 Karina, professora de Esperanto da Universidade de São Paulo (USP) e outras pessoas se encontrarão na FFLCH (Faculdade de Filosofia, Letras e Ciências Humanas), dentro da USP, para praticar Esperanto. A cada semana, serão lidos textos diferentes (curtos), selecionados durante a semana anterior. O encontro será realizado das 18h às 19h. Se alguém quiser participar, é bem-vindo. Para mais informações, escreva para Karina: kgsoliveira@gmail.com.

Na próxima semana será iniciado um novo grupo para iniciantes para aprender a língua. Karina vai orientar as lições no mesmo lugar na USP, sempre às terças-feiras, de 17h30 até 18h30.

BEJO

Atenton! BEL Informas volas scii: kiuj estas niaj venontaj eventoj?

Sennombro da eventoj okazas en Brazilo dum la tuta jaro. Parto de la misio de **Brazila Esperanto-Ligo** estas ilin disvastigi al ĉiuj, kaj ***BEL Informas*** estas komunikservo je la dispono de nia tuta komunumo. Sendu al ni novaĵojn pri eventoj en via regiono - miloj da homoj scios pri ili kaj igos ilin sukcesaj pere de nia ***BEL Informas***

Ni atendas viajn informojn!

[Klaku ĉi tie por scii kiel sendi viajn novaĵojn.]

Teamo de BEL Informas

Atenção! O BEL Informas quer saber: quais são nossos próximos eventos?

São inúmeros os eventos de Esperanto no Brasil durante todo o ano. Uma das missões da **Liga Brasileira de Esperanto** é divulgá-los, e o ***BEL Informas*** é um serviço que está à disposição de toda a comunidade. Conte-nos de eventos em sua região - milhares poderão inteirar-se deles e garantir seu sucesso com nosso ***BEL Informas***

Estamos aguardando!

[Clique aqui para saber como enviar suas novidades.]

Equipe BEL Informas

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Malkovru en via BEL@Butiko

Imperio de l' koroj - Poesia originalmente escrita em Esperanto, poemas variados, muitos deles inspirados dos campos de concentração. Por apenas R$ 24,00!

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/imperio-de-l-koroj.html

Descubra em sua BEL@Butiko

50-a BKE - Inscrição no 50º Congresso Brasileiro de Esperanto, janeiro de 2015, Rio de Janeiro. Diversas categorias!

http://belabutiko.esperanto.org.br/abonservo/index.php/congresso-e-eventos/50bke.html

La Patro (DVD) - Filmo bazita el la japana literaturo, kiu traktas pri rilato inter familianoj kaj pri pardono, nur R$ 23,00!

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/la-patro-dvd.html

Camiseta cor laranja - GG - Camiseta laranja com a estrela e o logotipo “Esperanto” na cor verde no lado esquerdo do peito, tamanho "GG", por apenas R$ 15,00!

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/camiseta-3-gg.html

AL BEL-MEMBROJ: POR RICEVI 10%-AN RABATON, PETU VIAN RABAT-KODON ĈE LA ADRESO:

AOS MEMBROS DA BEL: PARA TER DESCONTO DE 10% NA COMPRA DE LIVROS, SOLICITE SEU CÓDIGO JUNTO AO ENDEREÇO:

belabutiko@esperanto.org.br

belabutiko@esperanto.org.br

Vizitu vian virtualan butikon:

Visite a sua loja virtual:

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto
Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Marcus Aurelius Farias, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu kontribuojn al bel.informas@gmail.com

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel